

Eŭropa Bulteno

Oktobero 2007, № 9 (63)

De la redakcio...

Karaj legantoj,

En la antaŭa monato okazis multaj interesaĵoj pri kiuj ni informas vin nun.

Post la 7-a kongreso de EEU en Maribor, en Slovenio, okazis neatendita reago de slovenaj politikistoj.

Pri la parlamenta iniciato de dr-o Marko Pavliha ni jam skribis en antaŭa numero de Eŭropa Bulteno. Pliajn informojn pri ĝi kaj oficialan respondon de la Ministerio por eksterlandaj aferoj fare de la ministro dr-o Dimitrij Rupel, vi povas tralegi en aparta



ALDONAĴO al ĉi tiu oktobra numero de Eŭropa Bulteno. La sekretario de EEU sendis la konkludan kongresan dokumenton ankaŭ al la komisionano por scienco de Eŭropa Komisiono dr-ro Janez Potočnik, kiu afable dankis kaj rekomendis sendi ĝin al Leonard Orban, kion la la sekretario tuj faris. La sekretario de Orban dankis kaj sendis leteron en kiu ĝi diras, ke la dokumento estas studata.

Vendredon la 13-an de oktobro 2007 la unua programo de la tutslovena televido elsendis kadre de la elsendo Dobro jutro (Bonan matenon) 5-minutan intervjuon kun Zlatko Tišljar nur pri la demando de eventuala rolo de Esperanto en Eŭropa Unio.

Kaj jen la baza teksto de la konkluda kongresa dokumento:

KONKLUDA KONGRESA DOKUMENTO

LA KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO, en kiu partoprenis 256 delegitoj el 23 EU-ŝtatoj, Ukrainio, Rusio, Kroatio, Serbio, Kanado kaj Togo, inter ili parlamentaninoj de Eŭropa Parlamento, sinjorinoj Malgorzata Handzlik kaj Ljudmila Novak, kiu okazis de 28.07 ghis 4. 08. 2007 en Maribor (Slovenio) akceptis la sekvan konkludan dokumenton, kiu estas adresata al la slovena registaro:

La Kongreso petas slovenan registaron, ke ĝi:

1. Subtenu la proponon de vicprezidanto de la slovaka registaro Dušan Čaplovič esprimitan en letero (vidu aldone) adresita al ministroj de eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj kaj al ĉiuj membroj de la Eŭropa Komisiono **trakti la demandon de lingva politiko de Eŭropa Unio je interregistara nivelo** baze de konkludoj de Bratislava konferenco de Viŝegradaj ŝtatoj (Cz, Hu,

Pl, Sk) okazinta en novembro 2006 kiu jam traktis tiun temon kaj kie Esperanto rolis kiel unu el 7 laborlingvoj.

2. En la tempo de la prezidado de la Eŭropa Konsilio **proponu la fondon de nova fondaĵo ĉe Eŭropa Komisiono** interne de la programoj pri edukado kaj kulturo, **por subteno al projektoj kiuj evoluigas eŭropan identecon** kaj eŭropan konscion ĉe la ŝtatoj de EU, harmonie kun naciaj kaj regionaj identecoj, aparte ĉe la junaj, kie la projektojn povas prezenti ankaŭ malpli grandaj neregistaraj organizoj sen granda administra aparato kaj financa povo.

3. **Iniciatu edukadon por eŭropa konscio kaj tolero** kiel volontulan aktivecon en lernejoj de EU-ŝtatoj **harmonie kun la parlamenta iniciato de d-ro Marko Pavliha en la slovena parlamento**, transdonita en novembro 2006

4. **Kadre de sia informa sistemo** pri la agado rilate al EU dum sia prezidado **en unua duono de 2008 uzu krom la slovena kaj la angla ankaŭ Esperanton**, kiel tion faris en 2006 Finnlando. La tradukadon prizorgos esperantistoj tradukistoj el Slovenio.

5. **Rekomendu al la Eŭropa Komisiono ke ĝi konsideru rolon por Esperanto por** plibonigi lingvolernadon ene de EU kadre de multlingvismo, kaj pli longtempe kiel ebla neŭtrala solvo de lingva demando en EU, pro la lastatempaj ĉiam pli oftaj oficialaj postuloj pri tio .

AKEL SERĈAS PARTNEROJN



AKEL – Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj – kiu celas «pliprofundigi eŭropcivitanecan per Esperanto» jam de jaroj klopodas kunligi eŭropajn lernejojn kun apogo de la eks-programo Sokrates (nuntempe nomita Vivdaŭra Lernado) .

Ĝis la 29 de februaro 2008 oni povas kandidatiĝi al la programo Vivdaŭra Lernado de Eŭropa Komisiono – versio Comenius multflanka partnereco por atingi apogon al tiaj projektoj.

Per AKEL oni celas starigi grupojn de tri/kvar lernejoj el malsamaj landoj, kaj kun apogo de Eŭropa Unio veturigi lernantojn inter la lernejoj de ĉiu grupo. Ĝis nun du grupoj funkcias ĉimaniere. Temas pri Akel-1 kiu kunligas lernejojn de Hispanio, Pollando, Rumanio kaj Portugalio (ankaŭ Ukrainio kiel observanta membro); kaj Akel-2 kunligante lernejojn de Bulgario, Britio, Hispanio kaj Italio.

Do, se vi laboras en eŭropaj landoj ankaŭ vi povas «akelaniĝi». Tamen ne nur tiuj, kiuj apartenas al la nunaj landoj de Eŭropa Unio. Plulegu kaj pli informiĝu ĉe <http://lingvo.org/akel> la oficiala retejo de la projekto enkadre de Eŭropa Esperanto-Unio. Aliĝu al la projekto per la retejo por trovi partnerojn.

Luis Ladeira

KOLOKVO PRI PLANLINGVAJ BIBLIOTEKOJ KAJ ARKIVOJ

Iniciate de D-ro Detlev Blanke la Esperanto-muzeo en Vieno okazigis la 19-an kaj la 20-an de oktobro 2007 Kolokvon pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj.

Partoprenis inter dudek ĝis tridek personoj ĉe entute 11 prelegoj. Oni pritraktis profesie prilaboratajn bibliotekojn kiel en Vieno kaj Aalen, amatorajn bibliotekojn en Ĉeĥio kaj Bulgario, esploradon de la movada pasinteco ekde volapuko, ciferigadon de materialoj tekstaj, bildaj kaj sonaj, problemojn de konservado de sonmaterialoj ĉe niaj radioj k.s. La prelegaro estas eldonota.

Miroslav Malovec

ESPERANTO KAJ GRANDPOTENCOJ

En mia plurjardeka aktivado por Esperanto dum kiu mi havis ĉiujn eblajn funkciojn pere de kiu mi ofte kontaktis potencposedajn homojn, politikistojn, sciencistojn... mi konsciigxis pri la fakto, ke efektive la potenculoj pli aŭ malpli rekte subfosas la aferon de Esperanto tiam kiam ĝi troviĝas en pozicio eble povi sukcesi.

En la tempo de socialismo en Jugoslavio mi kontaktis multfoje la politikajn pintulojn en Kroatio kaj kelkfoje ankaŭ tiujn de Jugoslavio. Kiam ni petis ion kio rilatis esperantistajn internajn bezonojn, ili kutime estis afablaj kaj helpis per iom da mono aŭ gajno de iu ensistema statuso. Kiam ni proponis ion, kio iamaniere subtenis iliajn interesojn, ankaŭ tiam ni sukcesis ricevi helpon kaj iom da mono. Dum ni entreprenis aferojn rilatajn al nia amatora agado ankaŭ la publikaj medioj akceptis oftfoje niajn iniciatojn. Sed kiam ni volis ion plian, ekz. enkondukon de Esperanto en lernejojn, postulon ke politikistoj faru ion por Esperanto internacivele, kiam PIF farigxis forta manifestacio kaj grava kulturfaktoro; tiam troviĝis tuj fortuloj kiuj aŭ volis malebligi tiujn iniciatojn aŭ volis transpreni niajn aranĝojn. Sekve, okazis konferencoj pri Esperanto en lernejojn, sed neniu zorgis pri efektivigo de ties proponoj kaj konkludoj (oni ie en superaj lokoj enkorbigis la proponojn), ofte (eĉ Tito mem) oni elturnis sin pri niaj petoj enkonduki Esperanton en la lernejojn per "Kiam plimulto de la popolo tion postulos..."). Tutsame faris eĉ esperantisto Jonas, kiam li prezidis Aŭstrion.

Poste en la tempo de kroata ŝtato, kiam la ideoj de internaciismo kaj egalrajteco de popoloj en militanta kaj naciisma Kroatio estis danĝeraj ĉar tiuj ideoj kontraŭis la tiaman intereson konvinki la popolon ke necesas mortigi la malamikajn popolanojn, sciante tamen ke direkta malpermeso de E-agado ne estus politike oportuna, oni trovis du manierojn por haltigi la E-movadon: unue la prezidanto de la E-asocio pasivigis la organizon, kaj due oni aprobis formiĝon de konkurenca asocio, ke ili interbatigu. Ĉu nuntempe ne estas simila subfosa agado de iu?, kiu por malseriozigi la grandiozan avancon de esperantlingva vikipedio per aŭtomato fŭhtradukis pli ol centmil signifikajn artikoletojn en volapukon por fari ĝin pli forta en Vikipedio?

Nuntempe nin rekte kontraŭas la potenculoj de EU. Jan Figel jam montris la saman politikan logikon. Kiam ni tro aktive komencis protesti kontraŭ la realigata lingva diskriminacio, li ja havis instrukciojn por silentigi nin. Kiam la Radikala Partio de Italio plurfoje faris proponojn rilatajn al Esperanto, oni uzis eĉ kontraŭdemokratajn metodojn por faligi tiujn proponojn (nombrante la voĉojn per manlevo). Kiam aperis oficiala raporto pri pasintjara debato pri eŭropa estonteco kaj en ĝi alineo pri Esperanto (Summary Future of Europe debate (2006-07-06), kiun ni ankaŭ aperigas en la Aldonaĵo), iu baldaŭ forigis ĝin el la reto.

La slovenan registaron oni silentigis kiam nun ĝi interesiĝis kion fari pri la propono de Eŭropa Esperanto-Kongreso diversmaniere ekokupiĝi en EU pri Esperanto – »iuj landoj« sugestis ke ĝi malakceptu kaj malebligu tiujn iniciatojn. La slovenaj burokratoj elpensis sensencajn »argumentojn« por senfortigi kaj relativigi la proponojn. (vidu en aldonaĵo de la Eŭropa Bulteno). Multaj politikistoj, kiuj scias sufiĉe multe pri Esperanto, kaj private ĝin taksas pozitive, ne havas kuraĝon ion vere entrepreni ĉar ili konscias ke la granda plimulto de politikistoj aŭ pro tio ke ili mem estas sub la influo de la propagando aŭ pro tio ke ili havas »instrukciojn« kontraŭ Esperanto, ridindigos ilin aŭ akre kontraŭos (mi mem aŭdis plurfoje tiajn dirojn de gravuloj kun kiuj mi persone parolis). Tamen, malgraŭ ĉio fojfoje troviĝas politikisto aŭ scienculo kiu kuraĝas ion entrepreni aŭ pro tio ke li mem estas forte konvinkita pri valoro de Esperanto aŭ pro tio ke li estas misinformita pri danĝereco de tia entrepreno por lia kariero aŭ pro tio ke li estas fine de sia kariero kaj volas fine fari ion sinceran.

Bedaŭrinde tiuj provoj kutime estas provoj de unuopuloj kiuj batas kontraŭ la muro de la ekzistantaj potencoj – kaj tiuj potencoj defendas la ekzistantajn sistemojn en kiuj ili profitas. En okdekaj jaroj en socialisma Kroatio Nikola Šegota eluzis la pozicion de vicprezidanto de kroata parlamento kaj sukcesis ŝanĝi leĝon laŭ kiu Esperantista asocio ricevis statuson de »socia organizo« kio rajtigis ĝin al leĝa konstanta financado el Kroatia Loterio. Tion poste detruis la kroata ŝtato kiu ne havis intereson ke Esperantistoj estu aŭtomate financataj kaj relative memstaraj.

Nuntempe ni havas la ekzemplon de prof. Selten el altaj sciencaj rondoj kaj ekzemplon de kelkaj politikistoj: sinjoro Marko Pavliha, parlamentano de Slovenio, kiu jam du-foje prezentis poresperantajn amendojn en la parlamento kaj diskutis pozitive por Esperanto kiam oni parolis pri nova leĝo por defendo de la slovena lingvo – tamen sen rezulto ĝis nun. Ni havas ekzemplon de slovaka vicprezidanto Ĉaplovič, kiu subtenis E-on kaj invitis la politikajn pintojn de EU ekokupiĝi pri lingva politiko, kiun inviton ankoraŭ ne subtenis iu ajn alia ŝtato. Ni havas ekzemplon de du Parlamentaninoj de EP, sinjorinoj Handzlik kaj Novak kiuj jam plurfoje estis »atentigitaj« aŭ certamaniere ridindigitaj pro tio ke ili malferme montris sian subtenon al iuj iniciatoj trakti Esperanton.

La efektivaj potencoj kiuj aktive agas kontraŭ Esperanto estas unuflanke la ĝenerala usonangla intereso plukonservi la politikan kontrolon super la mondo, kio inkluzivas la lingvan superregon kaj ekonomian gajnon – kaj alia potenco estas la instruist-pedagogia lobio de armeo da intruistoj de fremdlingvoj kaj pedagogiaj retoj kiuj defendas aron da homoj kiuj enspezas pro la ekzistanta sistemo en kiu necesas instrui lingvojn kaj tradukadi. Tiu lobio disponas pri ministroj de edukado kaj havas rektan influon al registaroj. Por ili Esperanto estas reala malamiko.

Kiel batali kontraŭ tio? Ĉu Davido vere povas iel superruzi Goliaton?

Kion oni faru ke la du Eŭroparlamentaninoj kreŭ interesgrupon kiu ekhavas respektindan povon? Kiel uzi la informretojn por diskonigi la scion pri Esperanto kaj disbati la antaŭjuĝojn kiujn intence disvastigas politikaj kaj instru-sciencistaj lobioj pagataj de kontraŭesperantaj interesgrupoj?

Kiel konvinki esperantistojn eluzi la eblojn esti financataj el eŭropaj fondaĵoj prezentante projektojn kiuj ne rekte estas poresperantaj kaj tiel uzi la rimedojn de la »malamiko« por fortikiĝi?

Jen kelkaj demandoj al kiuj mi lasas vin pripensi la respondojn.

Zlatko Tišljar

EDUKADO ĈE INTERRETO

La junulara organizo "Edukado ĉe Interreto", E@I (konata en la movado pro ties origina nomo "E-o ĉe Interreto") en mezo de septembro estis akceptita de Eŭropa Junulara Fondaĵo, EYF kiel internacia junulara organizo aganta Eŭrop-skale.

Per tiu paŝo la iama faka sekcio de TEJO ekhavis similan juran statuson kiel la patrina organizaĵo, kaj tiu membreco ebligas al E@I memstare peti financajn subvenciojn ĉe diversaj forumoj.

La organizo "Edukado ĉe Interreto" realigis jam plurajn projektojn, kaj pretigis retejojn kiel lingvo.info, interkulturo.net, lernu.net, nitobe.info kaj komputeke.net.

Pliaj informoj pri E@I kaj ĝiaj projektoj estas legeblaj ĉe la retejo <http://ikso.net/>

Petro Balaz

TURISTOJ POVAS VIZITI STRASBURGON ESPERANTE

500 000 vojaĝantoj eniras la boatojn de la Strasburga Sendependa Haveno ĉiujare. Pro tio, kaj celante utiligi Esperanton, ni proponis al la Haveno traduki la promenadon tra la urbocentro kaj la eŭropa kvartalo al Esperanto.

La estro de la haveno akceptis la proponon, kaj transdonis la francan tekston al ni. Post adaptiĝo al la internacia publiko kaj traduko, helpitaj de Catherine Roŭ kaj Ginette Martin, la strasburgaj klubanoj surbendigis ĝin. Ni fine kontrolis longecon de ĉiu sekvenco, kaj dank'al la ĉina versio kiu estas sufiĉe longa, ni havis sufiĉe da tempo por paroli klare.

Nuntempe, Esperanto aŭskulteblas ĉe tegmentaj boatoj "Nuée bleue", "Belle Strasbourgeoise", "Rouget de l'Isle" kaj "Petite France". Venontjare, la lasta tegmenta boato "Gustave Doré", kaj la sentegmentaj boatoj ricevos ĝin post adaptiĝo de sia konsistemo.

Esperanto nun fariĝas la deka lingvo aŭskultebla dum la vizito. Antaŭ ĉiu ekiro, la ŝipestro anoncas ĉiujn dek lingvojn per laŭtparolilo. Ĉiuj ĉeestantoj aŭdos la frazon

"Por aŭskulti la ĉiĉeronadon per la internacia lingvo Esperanto, elektu numeron 10".

Ĉar eble vi ne havos tempon enŝipiĝi, aŭ vi ne ŝatas tiun rimedon por malkovri la urbon, vi povas elŝuti la sondosierojn kaj aŭskulti ilin per via mp3-ilo. Vizitu

<http://www.esperanto-strasbourg.net> aŭ <http://benecyril.free.fr> .

Klubanoj aldonos poste aliajn dosierojn, kiuj rilatos al la katedralo kaj placoj Kleber kaj Gutenberg.

Nia plano estas nun organizi inaŭguron de tiu nova uzebleco de Esperanto, venigante gravulojn kiel Eŭropaj Parlamentanoj. Ni planas filmi inaŭguran paroladon, aldoni bildojn de la urbo, kaj disvastigi ilin senpage al ĉiuj televidkanaloj en Eŭropo kiuj volos raporti pri la evento.

Cyrille Hurstel



PREMIO ZAMENHOF DE ITALA ESPERANTO-FEDERACIO POR LA JARO 2007

Itala Esperanto-Federacio ĉiujare disdonas la Premion Zamenhof al konataj rolantoj de la socia vivo en Italujo, kiuj per sia agado kontribuis al la realigado de la idealoj de la Esperanto-movado. La dona ceremonio okazos ankaŭ ĉi-jare en Ankono (Ancona) la 7-an de decembro 2007 en la loka "Teatro Sperimentale".

La premiojn ricevas ĉi-jare:

- Gianfranco D'anna, vic-direktoro de la radia kanalo 1-a, pro la dissendoj "Forgesita Planedo".
- Manuela Dviri, ital-devena ĵurnalistino en Israelo pro la iniciatoj pri kunlaborado inter israelaj kaj palestinaj kuracistoj en malsanulejo en Jerusalemo.
- Stefania Casini, aktorino kaj reĝisorino pro dokumentaj filmoj kun granda socia engaĝiĝo.

Renato Corsetti

ITALAJ ESPERANTISTOJ DUM LA AGO-TAGO 2007

La partopreno de italaj esperantistoj al la informaj agadoj dum la sabato, la 6-an de oktobro, kaj la dimanĉo, la 7-an, okaze de la Ago-tago 2007 estis bon-nivela.

En kelkaj urboj oni aranĝis la tradiciajn informajn budojn en ĉefaj stratoj. Tipa ekzemplo estis tiu de Milano. De la 9-a matene ĝis la 18-a almenaŭ ses milananoj deĵoris ĉe la tablo pretigita per eta ekspozicio da libroj, revuoj, k.t.p. por disdoni flugfoliojn kaj diversan informan materialon kaj por respondi al la pluraj demandoj de la scivolemaj pasantoj. Kompreneble la interesitaj vizitantoj estis pli multnombraj dum la posttagmezaj horoj. Iom surprizis la konstato ke la plejmulto de la interesitoj ne estis milananoj kaj ke kialoj aŭ ofte kiel enmigrintoj.

En Florenco oni iom fruigis la Ago-tagon kaj la 4-an de oktobro la anoj de la Florenca Esperanto-Klubo partoprenis en festo de la studrondoj de la urbo, ĉar ili aranĝas studrondon pri Esperanto, la lingvo de paco, subtenata de la urbo. Ili disdonis informan materialon per propra tablo kaj legis en Esperanto la Kanton de la kreitaĵoj de Sankta Francisko el Asisi.

Ankoraŭ pli impona estis la partopreno de esperantistoj, ĉefe el la regiono Marke, al la tradicia pac-marŝo inter Peruĝa kaj Asisi. La esperantistoj, venintaj per aŭtobuso, partoprenis la marŝadon malantaŭ propra tre videbla banderolo. Miloj da flugfolioj estis disdonitaj al la ceteraj partoprenintoj. Andrea Montagner kaj Marco Menghini, konsilantoj de Itala Esperanto-Federacio estis inter la

gvidantoj de la Esperanto-partoprenantaro. Pluraj kunmarŝantoj demandis pri Esperanto kaj volis esti komplete informitaj kaj ricevi plian materialon. Inter ili estis konata itala misiisto, Alex Zanotelli, tre aktiva organizanto de alternativaj iniciatoj. La mesaĝo de la Esperanto-movado pri demokratiaj rajtoj ankaŭ en la lingva kampo estis aparte ŝatata.

Entute ni povas esti kontentaj pri la ĉi-jara agado.

Renato Corsetti

Novaĵoj el eŭropaj landoj ekter EU

MOSKVAJ JUNULOJ AGAS PUBLIKE



En moskva parko dum preskaŭ du horoj ni, sidante ronde sur la herbejo, kantadis kaj deklamis en diversaj lingvoj, respondis demandojn de la prilingva kvizo, skribadis la vorton "Saluton!" en tiuj lingvoj, en kiuj povis, reklamis la 2-an MLF, okazontan la 28-an de oktobro, disdonadis bildkartformajn flugfoliojn kun E-gramatiko al ĉiuj ĉeestintoj kaj al interesiĝantaj preterirantoj. Pro tiu disdonado mi scias, ke en la manifestaĵo estis engaĝitaj ĉirkaŭ 120 homoj - ĉar tiom da flugfolioj estis distribuitaj. Anonco pri la manifestaĵo kun la mencio, ke ĝin organizas junulara esperanta klubo EK MASI, aperis en du numeroj (N 12,13/2007) de la senpaga junulara gazeto "Akcija" (eldonkvanto - 200.000 ekz), kie laboras nia klubano. Malgraŭ ĝustatempe dissenditaj informoj por la gazetaro, venis eĉ ne unu ĵurnalisto, tamen la kursanino de FaRo, kiu laboras en la junulara ĵurnalo "Fanograf" kaj en iu junulara NV-kanalo intervjuis min kaj filmis la okazadojn.

Irina Gonĉarova

INTERESA IDEO DE SVISLANDAJ ESPERANTISTOJ

La ĝeneva grupo La Stelo lanĉis kun subteno de Svisa Esperanto-Societo konkurson por 100 homoj kiuj pretas lerni Esperanton dum la venontaj monatoj,
<http://www.concours-esperanto.ch/>><http://www.concours-esperanto.ch/>.

La anonco esence diris: Kun la celo pruvi, ke Esperanto estas facile lernebla lingvo oni serĉas junulojn, kiuj ekde nun ĝis la 15-a de marto 2008 per iu ajn rimedo provos lerni la lingvon: libroj, kursoj, interreto, privatinstruisto ktp. La premioj varias inter 500 kaj 3000 svisaj frankoj. Por partopreni la konkurson oni devos sendi originalan 200-vortan tekston en Esperanto plej malfrue la 15-an de marto 2008 kaj partopreni ekzamenon je fino de marto 2008.

Fakte jam malmultajn tagojn post la lanĉo de la konkurso ni atingis la 100 aliĝojn! - Do ni havas jam la 100 kandidatojn kiuj nun studas la lingvon por partopreni en la premiado. Kaj nun ankoraŭ daŭre venas pliaj interesuloj!!!

Do oni jam nun povas paroli pri la plej sukcesa kampanjo okazinta por Esperanto en Svislando de post la tempo kiam Lidia Zamenhof en la 20-aj jaroj faris sian prelegvojaĝon!

Dietrich Weidmann

18-A MONTKABANA RENKONTIĜO OKAZIS EN KROATIO EN INSULO CRES

MKR jam estas tradicia renkontiĝo por esperantistoj-montmigremuloj en kiu dum la 17 jaroj la partoprenantoj migris tra multaj montoj en Aŭstrio, Kroatio kaj Slovenio, kaj de kelkaj el tiuj montoj videblis maro, sed tamen nur ie en fora malproksimeco. Ĉi-jare estis tute male, la partoprenantoj estis ĉirkaŭitaj per maro, Adriatiko, je ĉiuj flankoj, ĉar la aranĝo okazis sur kroata insulo Cres!

La aranĝo okazis en vilaĝo Beli, la loko loĝata jam dum jarmiloj, ekde antaŭ-Romiaj tempoj, sed ĝi nun havas nur 20 konstantajn



enloĝantojn, unu pensionon, unu gastejon kaj plej proksima vendejo troviĝas 20 km for. La menciita pensio estis la ĉi-jara MKR-ejo kaj al la partoprenantoj, dum jaroj al kutimigitaj al ne ĉiam luksaj montkabanoj, ĝi ofertis agrablan tranoktadon kaj tre bongustajn manĝaĵojn. Kaj spite al apenaŭ finita somero (la aranĝo okazis dum lasta semajnfino en septembro) kaj la vilaĝo kaj la insulo mem aspektis tute malplenaj kun apenaŭ kelkaj videblaj turistoj. Ne nur plaĝoj (la akvo ne estis tre varma, sed 20 gradoj ja tamen sufiĉis por naĝi ...) estis dezertitaj, ankaŭ ĉio alia ...

Kelkaj faktoj pri la ĉi-jara MKR-partoprenantaro: venis eĉ 43 personoj el 10 landoj. Estas rimarkinde ke jam dum lastaj 3 jaroj MKR-on partoprenas esperantistoj el dek landoj ... kaj aliaj mirindaj faktoj estas tiuj ke preskaŭ 20% de partoprenantoj estis infanoj kaj la fakto ke kvar personoj venis al MKR per bicikle, 3 germanoj kaj 1 nederlandano!

Kia estis la MKR-programo? Kiel kutime dum MKR, la migradoj estis la ĉefaj programeroj, sed ĉi-jare la supre menciitaj asocioj montris al ni almenaŭ parte lokan vivon kaj lokajn tradiciojn.

Ĝis la venonta septembro en Slovenio!

Vanja Radovanović

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 26-an de oktobro 2007.

Redaktorino: Vesna Obradović.

Ĉi-numere kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Peter Baláž, Miroslav Malovec, Luizo Ladeira, Dietrich Weismann, Renato Corsetti, Cyrille Hurstel, Irina Gončarova, Vanja dovanović kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu